

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-ro 10 \* 4. Dec. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

### Esperanto en la Mez-Lernejoj de Hungarlando.



Andrassy-Strato en Budapeŝt.

Hungara reĝa ministerio  
por religio kaj instruado.

N-ro 114 B 16/1920.  
V.

Mi permesas, ke la Hungara Landa Esperanto-Societo en la ŝtataj kaj reĝaj katolikaj mezlernejoj sub mia ordonpovo arangu senpagajn Esperanto-kursojn, parte por la memvole anonciĝantaj profesoroj, alparte por la lernantoj memvole anonciĝantaj. Ĉi tiun permeson mi ligas al sekvantaj kondiĉoj:

1. La necesajn instruantojn elsendas kaj pagas la societo.
2. La kurzoj aranĝotaj po instituto aparte povas okupi maksimume du horojn semajne kaj devas finiĝi ĝis 31 majo 1921.
3. La organizo de la kurzoj, respektive la fikso de la lernejoj, devas okazi post aŭskulto kaj aprobo de la institutaj direktoroj. Budapeŝt, la 30-an de oktobro 1920.

Haller p. m.  
(ministro.)

Ĉi tiun sukceson gravan kaj neatenditan atingis s-ano Aleksandro Laquer, ĝeneralsekretario de la Hungarlanda Esp. Societo, kiu persone transdonis tiurilatan petkskribon al la tiama ministro Haller, konvinkinte lin pri neceseco de Esp. instruado fakultativa. Bedaŭrinde ne estas sufiĉaj instruantoj.

### La Kontranrevolucio de Hungaraj Esperantistoj.

Pli vere ĝi estis simpla revolucieto, sed ĉar tiutempe regis en Hungarlando revolucia sistemo kaj ĉiu agado kontraŭ tiu sistemo aŭ eĉ nur kontraŭ unu ordono de tiu ĉi sistemo estis nomata kontraŭrevolucia agado, do ankaŭ tiu ĉi demonstracio de budapeŝtaj esperantistoj devas esti nomata kontraŭrevolucio.

Ĝi okazis la 30-an de julio 1919. Ĝis hodiaŭ nek unu gazeto esperantista priskribis ĉi tiun ĝis nun unikan okazintaĵon en la esperantista vivo, do eĉ nun post unu jaro ankoraŭ estas certe inda kaj interesa ĝin priskribi por la tutmonda esperantistaro kaj por la historio de Esperanto.

Ĝi ne estis efektiva revolucio aŭ demonstracio politika. Ĉu la esperantistoj uzis nian lingvon por politikaj aferoj aŭ per politikaj aferoj, estas alia temo. Tiu ĉi revolucieto unutaga estis pure lingva! Kaj kontraŭ kio povus revolucio nia paca batalantaro lingve? Nature nur kontraŭ malamiko de Esperanto, ĉu kiel internacia lingvo ĝenerale, ĉu kiel favoranto de alia sistemo. La afero direktiĝis kontraŭ la ĉie tre ŝatata lingvoprojekto Ido. (Ke ĝi estas ŝatata, montras, ke la esperantistoj, anstataŭ per ĉiuj fortoj labori por la sukceso de Esperanto, ofte plivolonte kaj eĉ aliajn aferojn lasante okupas sin kun aparta ĝuo pri la lingvoprojekto Ido!)

Jen la antaŭhistorio de la revolucieto: Jam en 1912 oni permesis la aranĝon de kurso ĉe la budapeŝta universitato por la lingvo Esperanto. Tiam instruis d-ro Béla Rácz, nature ne nur universitatanojn. En 1918 post la unua revolucio tiu ĉi permeso estis de la rektoroficejo denovigita kaj post enkonduka parolado de d-ro Aleksandro Gießwein instruis tie d-ro Leono Lóránd. Sed dum la konsilantarregistro transprenis la direktadon de la universitato prof. d-ro Dienes, unu el la plej malnovaj kaj plej fervoraj idistoj hungaraj. Li estis samtempe direktoro de la tiama laborista ĉeflernejo. Ŝajne al li sukcesis varbi d-ron prof. Schmid de lingvo-scienca. Tiu tempe prof. d-ro Simonyi, tre fama hungara lingvisto (kiu antaŭ unu jaro mortis) subskribis petkskribon de esperantistoj, ke oni enkonduku oficiale nian lingvon

en la universitaton kun konstanta katedro por ĝi. Samtempe la idistoj, tiam tre fortaj, endonis petkskribon, ke oni enkonduku Idon kaj starigu Mondlingvinstituton, kiu okupiĝas kun ĉiuj mondlingvoj, sed instruas oficiale al ĉiuj instruistoj, ktp. nur Idon. Ĉe unua kunsido ĉeestis prof. Simonyi kaj li sukcesis atingi tion, ke Esperanto estu samvalore akceptata, kiel Ido. Post unu monato la ĉiam aktiva samideano Balkányi hazarde eksciis, ke oni eldonis ordonon ĉe la ministerio (tiam popolkomisarejo) por instruado, ke ĉe la universitato starigos „Ido-Mondlingvinstituto“ kun oficistoj el tiama budapeŝta idistoj pagotaj. Li sukcesis ekscii el la dokumentaro de la universitato, ke la profesorkunveno dumtempe havis novan kunsidon, (pri kio oni ne sciigis la esperantemajn profesorojn) ĉe kio oni akceptis la rezolucion, ke la antaŭa kunsidrezolucio ŝanĝigas kaj oni akceptas nur Idon. Nature la vodonantaj profesoroj ne konfis ambaŭ lingvojn, nek unu, ili nur akceptis, ĉar ne estis kontraŭidiro, la raporton de la profesoro por Ido. Tiu ĉi sciigo tre ekscitis la esperantistojn, kiuj tiam laboris tre multe, por nia lingvo. Nur la laborista societo funkciis tiutempe kaj s-ro Balkányi tie en komitatokunsido eksterordinara konatigis la aferon. Oni decidis tujan agon. Ankoraŭ tiuvespere la ĉeestantoj kunskribis la adresojn de ĉiuj membroj kaj esperantistoj de Budapeŝt, kaj ankoraŭ la saman nokton Balkányi alportis telegramojn al la poŝto por tuj ekspedi ilin al adresatoj, laŭ kio ili ĉiuj ĉeestu la 30-an jaŭde matene antaŭ la konstruaĵo de la publikinstruata ministerio. Tiam ĉefoficisto, Paŭlo Robicssek, eĉ aranĝis, ke la telegramoj iru senpage, kiel ŝtataj telegramoj!

La konsilantarregistro vivis siajn lastajn tagojn. La ruĝan armeon oni venke repuŝis de la rivero Tisza. Estis ekscititaj tempoj, kvankam oni ne sciis, ĉu la registro restos aŭ falos jam tiam. Nature estis severa situacio, kaj oni ne povis grupiĝi sur la stratoj. Tamen jaŭde matene granda amaso da esperantistoj ŝvarmis antaŭ kaj ĉirkaŭ la konstruaĵo de la ministerio. La plej multaj ne sciis, kio estas, sed oni tuj klarigis al ĉiuj la aferon. La komiserio ne akceptis la deputacion sendotan, ĉar li — jam ne estis tie. Neniu volis unue akcepti la gvidantojn de esperantistoj, kiuj verkis mallongan skribaĵon — ne

petkskribon, sed ultimastilan postulon! Sed la esperantistoj senpacience postulis sian aŭskultadon kaj okupante la ŝtuparon, ili enpenetris la ĉamburon de la anstataŭanto de la komisaro.

Li do fine forlasis la konsilon ĵus haltintan kaj aŭskultis la energian parolon de Robicssek, kiu diris, ke la esperantistoj sincere kaj ideale laboras por sia ideo, sed se oni volas per malbonintencaj, el nescio kaj erarigo farintaj decidoj detru la malfacile konstruitan laboron, oni parolos per agoj! Li transdonis la ultimaton, kio postulis, ke oni starigu en la ministerio sektion de Esperanto per esperantistoj nomotaj de la societo, ke oni enkonduku en ĉiujn lernejojn Esperanton prove dum unu jaro, instruistan ateston donos la societo, ke la ministerio ne faru ian ajn rezolucion aŭ ordonon pri mondlingva afero sen tio, ke ĝi preparolus kun la gvidantaro de la esperantistoj, ke oni donu respondon al tiu ĉi skribaĵo dum tri tagoj. Ankoraŭ parolis du rusaj samideanoj, unu laboristo kaj unu junlaboristo, energie postulante la objektivan agadon kaj la rekonon, ke nur Esperanto povas servi, kiel helplingvo internacia. La respondo estis afabla. Laŭ la respondo ankoraŭ ne estas starigita la „Ido Mondlingvinstituto“ kaj ankaŭ ne estos (reale la ordono pri tio estis jam en universitato) kaj ke oni plenumos la punktojn; sed ni plilingvu la atendiemon ĝis unu semajno. La ĉeestantoj konsentis kaj oni foriris entuziasme kaj kontente. Tia energia voĉo kontraŭ ŝtata potenco ankoraŭ ne estis aŭdebla de esperantisto por Esperanta afero! Kelkaj eĉ reale esperis, ke tiu ĉi teatraĵo havos realan sukceson.

La alian tagon falis la konsilantarregistro, post kelkaj tagoj la tuta socialista sistemo. La nova registaro nulgis ĉiujn aranĝojn de la revolucia registaro, do ankaŭ tiujn por Ido. La oficejoj de ministerio kaj la gvidadon de universitato forlasis la dumtempaj okupantoj kaj la katedro kaj mondlingvinstituto por Ido farigis same ne realigita sonĝo, kiel la Esperanto-sekcio de la publikinstruata ministerio kaj la — post-semajna respondo.

Sed la esperantistoj tamen montris, ke ili estas pretaj por sia justa afero, por Esperanto, batali ĝis la fino!

Vera Nurhom.

## Jam nun preparu vin al la Intern. Postkongreso Aug. 1921 en Budapeŝt!

## Iom pri propagando per la nacia gazetaro.

Ĉiunonate ni, redaktistoj de la Esperanta gazetaro, havas la ĝuon konatiĝi kun kelkaj deĵoj da novaj kajeroj de la esperantistaj gazetoj. Kaj oni devas konfesi, ke tio estas signo de vigla vivado. Kaj tamen estas multaj aferoj en nia gazetaro, kiuj emas nin malĝojigi, kelkfoje eĉ ĉagrenas. Tio valoras ĉefe pri la naciaj „propagandaj“ gazetoj.


Povas esti, ke la samideanoj en aliaj landoj havas ne similan sperton ol la nia, sed almenaŭ ĉi tie en Finnlando ni devis jam multfoje konstati, ke la rezultatoj atingebraj per propaganda gazeto kun nacilingvaj tekstoj estas absolute nulaj. La gazeton tamen legas nur la abonantoj, kaj la abonantoj estas ĉiuj esperantistoj. Certe, inter ili povas esti kelka nombro da personoj, kiuj ankoraŭ ne lernis la lingvon sufiĉe por senpeze legi Esperantan tekston. Al ili la nacilingvaj tekstoj eble estas ia komfortaĵo — kiu definitive estas nur malinstiga al la ellerno de nia lingvo — sed al neniu alia ili utilas. Se oni volus fari ian propagandon per nacilingvaj gazetoj, por tiu celo ni nepre bezonus tutan regimenton da vendantoj de unuopaj numeroj — kiel havas ekz. la savarmeo. Sed mi estas konvinkita pri tio, ke la tiel eluzota energio povas esti pli profite utiligata. Kaj ekzistas nenia kaŭzo paraleligi nian movadon kun la savarmea en la okuloj de la granda publiko.

Oni eble kontestos, ke la sola fonto por novaĵoj pri la progresoj de nia movado, kiun povas utiligi la nacia gazetaro, estas niaj propagandaj gazetoj. Povas esti, en kelkaj landoj, sed kies estas la kulpo? Kaj cetere, ĉu vi ne jam konstatis, ke la naciaj taggazetoj multe preferas impresi novaĵojn aŭ artikolojn, kiun vi persone transdonis al ili, ol la saman tekston el via propaganda gazeto?

Ni legis antaŭ ne longe el „Germana Esperantisto“, ke pli ol 80 germanaj gazetoj promesis regule impresi la novaĵojn donotajn de la gazeta servo de Germana Esperanto-Asocio. La novaĵoj min tre ĝojigis. Nun estas la ĝusta vojo malfermita. Oni nur sekvu la ekzemplon.

Efektive, la problemoj pri propagando per la naciaj gazetaroj estas solvebla nur sur tiu vojo. Kaj fine ĝi estas ankaŭ pli malkara ol la eldono de nacilingva propaganda gazeto. Sed la sukceso de la pargazeta propagando ĥavas ankaŭ aliajn premisojn.

Nome, ni estis ĉi tie en Finnlando feliĉaj por povi starigi similan servon. Ĉiusemajne ni povas multobligi kaj dissendi novaĵojn pri nia movado al ĉiuj Finlandaj gazetoj. Sed — kiel havigi la novaĵojn? Ĉu vi kredas, ke ne estas sufiĉe riĉaj por povi salajri kiel redaktanton de tiuj novaĵoj personoj, kiuj scias ĉiujn lingvojn, en kiuj aperas la Esperantaj gazetoj? Efektive, la redaktoro de „Esperanta Finnlando“ havis okazon lerni la lingvojn svedan, germanan, francan kaj anglan. Kaj en la redaktado li iom post iom lernis multon kompreni el holanda, itala, hispana kaj portugala lingvoj. Sed aperas ankaŭ Esperantaj gazetoj en hungara, ĉeĥa, japana ktp. lingvoj. — Nu, la plejparto de la interesaj novaĵoj certe aperas en „Esperanta Finnlando“. Ĉu la novaĵisto do



Urba Terma Banejo kaj Gellért-Hotelo en Budapeŝto.

atendu ĝis tio, kaj lasu la novaĵojn malnoviĝi por la nacia gazetaro?

Ne, se ni volas atingi la publikon per la nacia gazetaro, ni nepre bezonas Esperantan fonton por la novaĵoj. Lokon, kie la novaĵoj rapide kolektiĝas kaj de kie ili sen prokrasto disvastiĝas en la tutan mondon, sen lingvaj baroj kaj tradukaj malfacilaĵoj.

En la nuna momento tio estas plej efike realigebla per „Esperantisto Triumfonta“. Ĝi aperos ĉiusemajne. Se ĝi havos rapide laborantajn raportistojn en ĉiuj partoj de la mondo, per ĝi la naciaj novaĵkontoraj povos ricevi ĉiujn novaĵojn sen troa prokrasto. Kaj tiam la ŝancoj de publikigo estos multobligitaj.

Sed ne tio sufiĉas. La redaktado de niaj novaĵoj devas ankoraŭ multe progresi. Ili devas fariĝi pli precizaj. Ekzemple informoj pri kongresoj, kiuj apobis Esperanton, sen dato estas senvoloraj. Same, raporto pri la „Internacia Universitato“, en kiu oni nomas nur la Esperantajn prelegojn, nenion dirante pri la alilingvaj, estas neaprezebla. Mi nenion volas diri pri la longaj listoj de festenoj esperantistaj, promenoj, kunvenoj kun babilado en Esperanto, kiuj plenis gaso de la kronikoj de niaj plej „seriozaj“ gazetoj esperantistaj. Ĉar tio estas nur tro akra kritiko. Seriozecon ni devas almiti al ni. Journalistoj kapablaj ni devas komenci postuli de niaj redaktoroj kaj raportistoj. Nur per tio ni povas ion venki.

La novaĵoj estu ordigitaj sub rubrikoj ne laŭ landoj sed laŭ enhavo. Tio per si mem metas postulojn al la raportanto. Li nome devas almenaŭ scii, pri kio li raportas. Ni ja povas ĉiam restigi rubrikon „Societa vivo“, sed tiu estas publikigata ĉefe por la esperantistoj, ne por represoj en naciaj gazetoj. Kaj ĝi povas enhavi diversajn intimajn komunikojn, al kiuj oni ne metu jurnalistajn postulojn. Sed la vera kroniko de la sukceso de nia movado devas esti tute reformata.

Kion do efektive postulas nia movado? 1. Centran organon por nia movado, almenaŭ ĉiusemajne elirantan ĵurnalon, kun proksimume tia programo, kia rezultus el la kunfando de „Esperanto“ kaj „Esperanto Triumfonta“. Per ĉiunaciaj laboremaj raportistoj ĝi provizos nin per ĉiuj novaĵoj.

2. Naciajn novaĵkontorojn por traduko kaj republikigo de la novaĵo en la nacia gazetaro.

3. En la landoj, kie la lernado de Esperanto estas sufiĉe vigla por movigi naciajn gazeton Esperantan, oni publikigu tian ekskluzive por celoj de instruado, laŭ la bonega modelo de la malfeliĉe ĉesigita „Esperanto Monthly“ (Edinburgh, Skotlando).

4. Revuojn kun faka kaj speciala programo.

Nenion plu ni bezonas efektiviĝi sur la kampo de ĵurnalismo.

Mi ne kuraĝas esperi tian forgesemon de propra ambicio, ke tiu plano estus baldaŭ efektivebla. Sed mi esperas, ke la redakcio de „Esperanto Triumfonta“ volas ziaparte akceli la atingon de realaj propagandaj rezultatoj almenaŭ per tio, ke ĝi efektivegos laŭ siaj fortoj akuratan informadon kaj raportadon pri la Esperanta movado tra la tuta mondo. Kun la postuloj al ĉiuj kunlaborantoj pri precizeco, netroigo, neprokrastemo, atento al la interesoj de la tuta monda ĉiunacia publiko, ne nur Esperanta. Fundamente, la postulo pri nur realaj novaĵoj.

Per konstanta efektiveco de Esperanta informado laŭ tiuj principoj ni faros grandan paŝon antaŭen.

Alberga (Finnlando), la 15-an de nov. 1920.  
Vilho Setälä.

## Foiroj.

Frankfurt a. M.

Laŭ iniciato de s-ano Kreuz la foir-oficejo aldonos ankaŭ Esperant-lingvan registron al la en januaro aperonta tiel nomata „Antaŭ-Katalogo“. Interesuloj kaj propagandistoj mendu la katalogon, kiu estos senpage disdonata, ĉe la „Messamt, Esperanto-fako, Frankfurt a. M. (Germ.)“. — La Esp. propagando por la tria internacia foiro bone sukcesis. Dank' al la energia helpo de multaj seriozaj esperantistoj alvenis 120 gazetoj en 19 lingvoj enhavantaj artikolojn pri la Frankfurt'a foiro.

Breslaŭo.

Oni ofte demandis min: „Kiajn rilatojn havas Breslaŭa Foiro kun Esperanto?“ Kaj tiu ĉi demando, kiel malnecesiga ĝi ankaŭ ŝajnas al ni Esperantistoj, tamen estas pravigita, ĉar vere dum la Breslaŭaj foiroj oni ne vidis eksterlandajn vizitantojn. Pro tio la estraro de la foiro ankaŭ ne estis favora al Esperanto. Tio ĉi nun ŝanĝiĝis. Oni ankaŭ komencis pensi pri estontaj tempoj, kiam la malfacilaĵoj de la nin ĉirkaŭantaj landoj ne plu ekzistos. „Kiam estos vera paco inter Polujo kaj Rusujo, kiam ne plu la malbona germana marko valoras 5 polajn kaj estos egalvalora al 100 sovjetaj rubloj, kiam la vasta ĉeĥo-slovaka ŝtato ree interŝanĝos siajn komercaĵojn kun ni kiel dum la antaŭmilitaj tempoj.“

La estraro de la Breslaŭa foiro nun konvinkigis, ke per la helpo de la Esperantistoj kaj de UEA ĝi kiel eble plej favore povas atingi la eksterlandan pri ĝia aranĝo, kaj antaŭ la proksima foiro, kiu okazos dum printempo 1921, eliros el Breslaŭo kune kun la germane skribitaj invitoj ankaŭ tiuj en Esperanto verkitaj.

Kaj neniu fremdulo bedaŭros esti veninta Breslaŭon. Nia urbo konstruis dum 1912/1913 admirindan ejon por ekspozicioj. En la norda antaŭ-urbo meze de la vasta, bela Ŝajniga-parko staras

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (6-a daŭrigo.)

Tamen la penso pri libereco ĉiam restis en la kapo de Mateo. Kiam ili ankoraŭ en Hamburgo estis parolantaj kun la drinkejmastero, kaj Dima lin demandis: „Volu klarigi! Kio estas illa tlea libereco, pri kiu oni tiom parolas?“

„Ha! oni ŝiras la gorĝon unu al alia, jen illa libereco!“ kolere respondis la mastro. „Tamen“, li aldiris, trinkinte la reston de sia biero, „ĉe ni oni ĝin scias fari ne malpli bone. Tial mi vere ne povas kompreni, kial kelkaj malsagaĵoj nepre deziras esti ĉirkaŭrabataj en Ameriko, preferante ĝin al sia hejmo.“

„He, he, ŝajne vi volas trafi per via ŝtono en nian legomĝardenon!“<sup>9)</sup> diris tiam la konjektema Dima.

„Min ne interesas fremdaj legomĝardenoj“, evitis la samlandano la rektan respondojn, „mi nur diras, ke en nia malnova mondo flu, kiu ŝiras la gorĝon de alia, tiu estas prava. Sed kio fariĝas en tiu nova mondo, vi mem vidos. Mi nur dubas, ke tie estas io multe pli bona.“

La mastro kredetle vidis en sia vivo multe da malagrablaĵoj. Lia respondo ne plaĉis al la Loziŝanoj, eĉ iom ofendis lin. Ke la homoj ĉie ŝiras la gorĝojn unuj al aliaj, tio certe povas esti vero, sed libereco devas ja esti io tute alia. Dima trovis necese rebati la ofendan aludon.

„Ĉie fariĝas la samo: kiel vi rilatas al homoj, tiel ili rilatas al vi; dikulo sin sentas komforte eĉ sur nudaj tabuloj, dum maldikulo eĉ sur kusenego ne trovas komforton. Sed, verdire, homoj tiel maldelikatan kiel vi, neniam ankoraŭ mi vidis.“

<sup>9)</sup> Rusa proverbo.

Do, ne tute agrable estis por ĉiuj la fino de la interparolado.

Kun niaj Loziŝanoj en la sama ŝipego troviĝis iu bohemo, viro jam maljuna, negaja, sed agrabla. Li veturis nun al sia filo, kiu bone prosperigis siajn aferojn en Ameriko. La maljunulo veturas, sed laŭ lia propra dirto pli bone estus, se la filo estus aranĝinta siajn aferojn en la patrujo. Tiaokaze la maljunulo ne devus nun ŝipveturi Amerikon. La bohema lingvo estas slava. Tial ili povis interkompreniĝadi. Dima baldaŭ trovis rimedon por esprimi siajn pensojn: kie la vortoj al li mankis, li helpis sin per la kapo, per la manoj kaj piedoj. Jen li klakis, jen ŝmatis, jen frapis per la mano, unuvorte — post mallonga tempo li jam estis amiko de la bohemo. La bohemo parolis germanan lingvon, do pere de li oni povis ricevi kelkajn sciigojn de la germanaj pasaĝeroj; la germanoj helpis apud la angloj...

Kiam la vento malfortigis, kaj la vetero devone estis bona, Dima kaj aliaj resaniĝis, kaj sur la ŝipo ekreĝis pli gaja humoro. Tiam la pasaĝeroj de la tria klaso venis sur la antaŭajn ferdekon; alikreska hungaro ludis fajflon, juna germano violonon, kaj la geĵunularo dancis kaj dancis, singarde evitante la ŝnuregojn kaj ĉenojn. Kaj super la oceano malproksimem flugis sonoj de muziko; la ondaj kunkantis kaj petole jetadis supren blankan saŭmon kaj ŝprucaĵon, defendoj saltadis por antaŭiĝi la ŝipegon. Kaj la koron plentigis samtempe gajeco kaj malgajeco.

Tiam Dima kun la bohemo sidigis len en angulo, invitis ankaŭ iun anglan aŭ germanon, sciantan anglan lingvon, kaj Dima lernis paroli angle. La anglo paroladis al la germano, la germano al la bohemo, kaj la bohemo al Dima. Antaŭ ĉio Dima, kompreneble, komencis lerni la amerikan kalkulon kaj multfoje ripetadis la fremde sonantajn vortojn, fleksante laŭvice siajn fingrojn. Poste li eksciis, kiel nomiĝas pano kaj akvo, plugilo kaj ĉevalo, domo, put, preĝejo. Cion li notis sur papero kaj, restante sola, lernis parkere,

li penis ankaŭ lernigi iun al Mateo, sed Mateo ne faris progresojn. Iu solan anglan vorton li sciis: „iri“, ĉar ĝi ja estas ankaŭ rusa vorto.

Foje Dima informiĝis ĉe la maljuna bohemo, kio estas amerika libereco. „Tio estas“, klarigis tiu, „kupra figuro, staranta sur insulo, virina figuro, pli alta ol ĉiuj plej altaj domoj kaj preĝejoj; ĝi staras kun suprenlevita brako kaj tenas en la mano torĉon, tiel grandan, ke ĝi lumas malproksimen en la maron. Interne troviĝas stuparo, per kiu oni povas supreniri ĝis en la kapon kaj en la brakon, kaj eĉ ĝis sur la pinton de la torĉo. Vespere oni bruligas fajron en la frunto kaj sur la torĉo, la fajro eligas brilon kvazaŭ lunan, eĉ pli fortan. Tiu kupra figuro estas nomata „Libereco“.

Dima rakontis tion al Mateo, sed al ili ambaŭ ŝajnis, ke ankaŭ la bohemo ne diris la veron. La drinkejmastero en Hamburgo parolis: — oni ŝiras la gorĝon, — jen ĉi tiu rakonto: — figuro elegantata lumon. — Ial Mateo rememoris sian maljunan avon Lozinski Ŝuljak, tiun saman, kiu herede donacis al li la biblion. La maljuna avo mortis, kiam Mateo estis ankoraŭ infano, sed restis en lia memoro iaj malklaraj rakontoj de la avo pri la pasintaj tempoj, pri militoj, pri la fama respubliko en la transdnepraĵa stepoj. Hodiaŭ, kvazaŭ memoraro pri la sirangaj sonoj, rakontitaj de la avo, starigis antaŭ liaj okuloj tiun pasinta epokon, ia vasteco, ia sovaĝa libereco... — Kiam ni renkontis tataron aŭ alian malamikon, tiam Dio helpu nin! — rakontis la avo. — Do, pensis Mateo, — tiam oni tiel same ŝiradis la gorĝojn unuj al aliaj! — Poste li rememoris, ke tiam ekzistis la servuta rajto de sinjoraro. Poste venis la liberigo. Tamen la libereco ankaŭ nun malestas... Lia kapo turniĝis, liaj pensoj nebuliĝis, tamen en lia cerbo restis nesolvita demando.

(Daŭrigota.)

la ekspoziciaj haloj, kvar rondaj temploj, interligitaj unu kun la alia. En ili nun vidiĝas ŝtofoj, lanaj kaj kotonaj, fabrikitaj en la gravaj fabrikoj de Silezio, vestaĵoj (la plej grava industrio de Breslaŭ estas la kostumfabrikado), subvestaĵoj kaj ŝtrumpoj, puntoj, manlaborkaŭdo de la montara loĝantaro kaj multaj aliaj objektoj bezonataj de la amaso.

Sed multe tro malvastaj estas tiuj temploj, ĉar mil ekspoziciantoj postulis spacon. Do oni ankaŭ uzis la spacon de la granda apuda „jarcenhalo“, la fama konstruaĵo el ferbetono, unu el la plej vastaj haloj de la fero. Ĝi estis destinata por grandaj koncertoj kaj spektakloj, kaj oni metis en ĝin la plej grandan orgenon, kiu ĝis nun estas konstruita en la mondo. Kiam tiu ĉi komencas laŭtigi siajn tonojn, kio okazas ĉiutage dum duonhoro, la parolo ekmortas sur la lipoj, la komercado ekhaltas kaj ĉiu ajn staras senmove, pie rigardante supren, de kie la potencaj lumonidoj eniras, supren, al tiu ĉi kupolo, kies ne apogita diametro estas 60 metrojn longa. La homo ŝajnas malgrandetulo vidalvide de tia vastega spaco.

Sed bone oni scias tiun ĉi spacon. Oni vidas tie krom teksaĵoj meblojn, parte tiajn por loĝejoj, plejparte tiajn por oficejaj ĉambroj, aĵojn por la mastrumado kaj aliajn pli grandan spacon bezonantajn objektojn, ĉe ĉerkojn.

La lasta foiro havis pli bonan sukceson ol la antaŭaj. La prezoj de la komercaĵoj dum la lasta tempo iomete malaltiĝis, kaj la komercistoj, kiuj ne multe aĉetis dum la antaŭaj monatoj, devis nun zorgi, ke iliaj stokoj rez farigu plenan. Ĉefe oni aĉetis bonekvalitajn komercaĵojn, kiujn oni ne estis vidinta dum la antaŭaj jaroj.

Do oni povas konstati, ke la ŝancoj por venontaj Brasiliaj foiroj estas bonaj. Mankas al ni ankoraŭ la vizito de eksterlandanoj. Helpe al tiu artikolo ilin aliri kaj ĝi helpas rapidigi la venkon de Esperanto en nia urbo.

SIEGM. FREUND.

## lernejo.

**BERLIN.** La Humboldt-Akademio elvokis s-ro-n d-ron. W. Winsch por legi pri Esp. de post la venonta jaro.

**FRANKFURT a. M. (Germ.)** S-ro Urban instruas en kurso de instruistoj, kiuj sekvis al la dekreto de la heslanda instrua ministro en Offenbach a. M.

**GLASGOW (Angl.)** La vesperaj klasoj en la Glasgow High School bone sukcesas. Ĝis nun 62 aliĝis la elementaraj kaj 50 la superan kurson. Kursoj ankaŭ starigas en la *Labour College*, kaj en la Societo mem. Alia skola eksperimento okazas nuntempe en *Blairhill School, Coatbridge*. F-ino Watson, animo de la Glasgova Societo, petis permeson al sia lernejestro, S-ro John Redpath, M. A., instrui Esperanton al knaboj en la taglernejo. Ŝi nun havas du klasojn, kun 25 knaboj en ĉiu. La knaboj havas la aĝon de 9-11 jaroj, kaj ricevas instruadon 1/2 horojn ĉiusemajne. Ĝis nun la knabetoj bone progresas, kaj multe ŝatas la lernadon de Esperanto. F-ino Watson ankaŭ instruas kurson sub la aŭspicioj de Y. M. C. A. en Coatbridge.

**NEWCASTLE-ON-TYNE (Angl.)** La ĉiujara ĝenerala kunveno okazis la 29 sept. La sekretario raportis, ke la kurso por infanoj progresas tre kontentige, kaj nuntempe 10 infanoj malpli ol 14-jaraj lernas la lingvon, kelkaj el ili jam korespondas alilande, kaj la aliaj tre petis la sekretarian, ke li sendu iliajn nomojn kaj adresojn al la sekretarioj de alilandaj grupoj, por eltrovi samaĝajn korespondantojn. Oni decidis vigle subteni la kurson, kiun la Loka Eduka Komitato intencas starigi en la Vesperaj Lernejoj; tiu ĉi venko estas la rezulto de la propaganda laboro de la grupanoj kaj kelke da N. O. Federaciatoj. La sekretario sendis raportojn pri la enkonduko de nia lingvo en aliajn britajn lernejojn, kaj komencis diskuton en la lokaj gazetoj pri la „Uflito de Esp. al studentoj de lingvoj.“ La anoj forte subtenis, tial, kiam la societo petis la Edukan Komitaton ke ĝi starigu kurson, la „tero estas jam bone preparita“, kaj la Komitato konsentis spite la kontraŭstaro de lokaj eminentuloj. S-ro R. G. Redpath instruos la Komitatan Kurson.

## Eklezio.

En Brighton (Angl.) okazis la 29 sept. la unua Esp. diservo en tiu ĉi urbo, sub la aŭspicioj de la Brighton Spiritualists Church en la Athenaeum Hall, kiu plenpleniĝis. Unue la prezidanto s-ro H. E. Everett diris al la ĉeestantaj anoj de la loka grupo kelke da bonvenigaj vortoj kaj prezentis la parolanton, s-ro-n A. J. Howard Hulme. Tre interesaj kaj entuziasmaj estis liaj diroj pri nia lingvo kaj ĝia iniciito, kun kiu li unue konatiĝis en Bulonjo-sur-Marŭ en 1905; li fervore konsilis al siaj aŭskultantoj la lernadon de Esperanto. Sekvis legado el la Nova Testamento farita de la Grupa prezidanto, kiun tradukis frazon post frazo la sekretario.

## Gazetaro.

**ANGLIO.** Laŭ raportoj en la lasta n-ro de British Esperantist aperis lastatempe pli ol 100 artikoloj pri Esp. en la angla gazetaro.

**GERMANIO.** Proksimume 90 gazetoj repreas nun la regulajn „Esperanto-Angulojn“ komunikatajn de la Germ. Esp. As.

## Posto.

Grava bato minacas la esperantistaron. La mondpoŝtkongreso en Madrid aprobis la kontraktaron de la mondpoŝtunuigo, laŭ kiu la internacia tarifilo estos fiksitaj je 50 centimoj por leteroj, 50 c. por poŝtkartoj kaj 10 c. po 50 gramoj por ĉiu presaĵo, negocpapero aŭ specimeno.

## Esperanto sumare.

— S-ro J. H. Fred, konata membro de la grupoj de Edinburgo kaj Glasgovo, translokiĝis al Sud-Afriko. Propaganda vojaĝo al Cape Town li faris bonegan propagadon por Esperanto. Laŭ afabla permeso de la sipestro li faris paroladon sur la ferdeko antaŭ proksimume 80 personoj. La rezulto estis kurso, en kiu partoprenis 21 gelnantoj, inter kiuj troviĝis du kuracistoj, dentisto, misiistino el Norvegio, kaj kvin medicinaj studentoj. S-ro Fred donis naŭ lecionojn, kaj uzis la „Esperanto Home Student“ de S-ro Robbie.

— Revenante de Novjorko per la vaporsipo „Aquitania“ antaŭ unu semajno, s-ro Bowyer el Huddersfield (Angl.) konatiĝis kun kelkaj el la vojaĝantoj, kaj estante fervora Esperantisto li nature citis Esperanton. Ili tute interesiĝis pri ĝi, ke li povis aranĝi kurson kun dek kvin lernantoj, kiuj serioze studis ĉiun lecionon.

Pli ol tio multaj vidis, ke io okazas, kaj staris ĉirkaŭe por aŭskulti.

Je la jaŭdo post kvar tagoj, s-ro B. instruis al ili kelkajn Esperantajn kantojn, kaj vendadon vespere la nove fondita „Aquitania Esperanta Societo“ donis koncerton.

## Societa vivo.

**DANZIG.** Okaze de la 15-a fondiĝofesto de „Danzigia Esp. Asocio“, kiun partoprenis ĉ. 500 personoj, infanoj de malpli ol 15 jaroj, direktataj de s-ino A. Tuschinski, prezentis la „kvar sezonojn“ en Esp. kaj germana lingvoj, tiel pruvante la facilan lerneblecon de Esp. por infanoj.

**FRANKFURT a. M.** La Esp. viano revetiĝas. Ĉie estas bona propaganda eblo. Bedaŭrinde mankas kunlaborantoj.

**F.-SACHSENHAUSEN.** S-ro Kreuz faris paroladon en stenografia unuigo „Stolz-Schrey“, kies dua prezidanto li estas. Plue li faris alian paroladon en la libera unuigo de libristoj „Faust-Novitār“, kiu invitis lin speciale.

## Nekrologio.

Sir Thomas Vezey Strong,

ekŝ-lordmajoro de London, vicprezidanto de Brita Esp. Asocio, mortis. Konata estis la kunveno en Guildhall, kie li — kiel reprezentanto de la urbo London — akceptis d-ron Zamenhof kaj la kunvenintajn esperantistojn el ĉiuj landoj (21 aŭg. 1907). Li estis unu el la plej fervoraj protektantoj de nia afero, kaj la tuta esperantistaro funebrias pri la perdo de tiu ĉi nobla kaj bona viro.

Rev. Horace Duffon,

mortis 81-jara la 4 aŭg. en Boston (Usono). Li estis sindonema samideano. Kun pastroj Schneberger kaj Cyprian J. Rust li aranĝis la unuan protestantan diservon en Esp.

## Recenzejo.

LIBROJ.

**SONĜO DE SOMEROMEZA NOKTO.** Komedio de William Shakespeare. El la angla lingvo tradukis Louise Briggs. 70 pg., 12 1/2 x 19 cm. Eldonis Brita Literatura kaj Debata Societo, Havajo de Brita Esp. Asocio, 17, Hart Street, London WC 1. Prezo: frankoj; karte bindita 2 s. 5 p., tole bindita 2 s. 9 p., lede bindita 3 s. 9 p. En landoj kun malbona valuto oni demandu la prezon ĉe la enlandaj Esp. libroj.

Jen nova perlo, grava libreto por la tutmonda literaturamanta esperantistaro. Nia librotezoro de klasikaj verkoj pli riĉiĝis je bonega tradukaĵo.

La dramoj kaj komedioj de la eminentaj poetoj ne estas propraĵoj de unuopa genro, sed de la tuta civilizita mondo. La nomo kaj gloro de Shakespeare estas tiamal ek trans la limoj de Britujo; la verkaro de tiu ĉi spiriteroo apartenas al la tuta homaro; ni nomu ĝin vere internacia. Nia majstro sentis tiun donante al ni la modelan tradukon de Hamlet. Lamberti tradukis Macbeth, kaj ni nun povas ĝe pasigi bejajn horojn legante la vere komikan komedion „A Midsummer Night's Dream“ en nia kara lingvo.

Ĉiu bone konas la grandajn malfacilaĵojn, kiuj prezentiĝas, se oni pene laboradas tradukante verŝon post verso. Naĉlingvaj tradukoj de versaĵoj nur malakurate respegulas la originalon, kaj mi povas denove ĝoĉi konstati, ke dank' al la riĉeco kaj fleksebleco de Esperanto estas eble verki tradukon, kies legado igas nin ĝui la tutan ĉarmon kaj belecon de la originalo mem. Nova pruvo, ke Esperanto estas taŭga diskonigi la naciajn poeziaĵojn de la klasikuloj ĉiutempaj al la popolo de l' terĝlobo, prezentante puran, nektripligitan formon, kiu ne perdis sian originalecon. Kompare al la germana traduko (v. Schlegel kaj Tieck) de la Shakespeare'a verkaro, mi devas malkaŝe diri, ke la Esp. traduko estas multe pli konforma kaj ĝusta rilate al la angla teksto ol la germana, kies ofte tre liberaj defankiĝoj envolvas la originalon en belan sed tro fantazian vualon. Mi gratulas la tradukinton pro ŝia valoro donaco; ŝia laboro estis peniga ne nur pro la ritmo, sed ankaŭ pro tio, ke la originala teksto estis tre malfacile tradukebla. La Shakespeare'aĵj parolinturo ne plu estas kutime en la nuntempa angla idiomato, kaj multe da britoj mem ne povas legi Shakespeare-ajn verkojn ne uzante vortaron, ĉar ne plu uzataj vortoj kaj vortformoj abundas.

Laŭ lingva vidpunkto nur malmulto estas drola. Menciinda estas la bona papero kaj la bela, klare legebla preso. La bindistaro erare duoble (dufoje) enmetis la paĝojn 7-22 en la volumeton. Preserarojn mi tute ne trovis.

Mallaŭdinda estas la vorto *Eĝeo*. Kial *Eĝeo*? La latina formo estas *Aegeus*; oni skribu do *Eĝeo* sen supersigno. Nova, vere stranga kaj ne korekta vorto estas la verbo *uliti*. Dufoje mi ĝin trovis. La tradukintino ĝin uzis en la senco de krii. ekz. la uluto ulutas la noktuo ulutas. Si tute forgesis aŭ ne scias, ke *uluto* estas speco de strigo. Same malkaŝta estas la vorto *vipuro*. Zamenhof mem konfesis, ke *vipuro* estas preseraro anstataŭ *vipero*. La samon skribas Boirac en sia granda vortaro. (Latine kaj litale: vipera; france: vipère; germane kaj angle: viper). La frazo „Jerne jurante“ ne plaĉas; la senco estas ion alia, ĉar oni ne temas jurante, kaj terti havas tute specialan signifon. En la antaŭparolo troviĝas la vorto *Sekspir*. Terura erkrakenaĵo! Skribu la proprajn nomojn naĉlingve! Ekz. Shakespeare (elparolu: Sekspir). La stranga formo *Sekspir* aspektas kiel maskita persono, kiun ek la propra frato ne plu konas pro la aĉa masko. Por nebritoj la vorto eufuisto ne estas sufiĉe klarigita. Sendidulo estas tre bona vortkunmeto enhavanta preskaŭ tutan frazon. Nacia lingvo preskaŭ ne povas imiti tion.

Ĝlanterio estas speco de sovaĝa rozo. Anĝvoso estas besteto serpentoforma (lat. anguis; france: orvet; germ.: Blindschleiche). Trito estas speco de ambfibio (lat. trito; france: triton; germ.: Molch). Zamenhof eraris en sia Universala Vortaro tradukante salamandon pro la germana vorto *Molch*. Inter salamandro kaj trito estas sufiĉe granda diferenco. Sendube nia majstro ne estis zoologisto. „Ĉi nokte“ estas pli bona skribmaniero ol „ĉinokte“.

Sed ĉio tio tute ne estas grava. Entute: bonega verketo, plej zorgeme tradukita, vere laŭdinda kaj dankinda fero de niaj britaj samcelanoj kaj varme rekomendinda legaĵo por ĉiuj gesamideanoj ŝatantaj bonan, klasikan literaturafon. (G. AjuL.)

**HUMORAJOJ.** Prof. H. Boucon. Eldonejo Oskar Ziegler & Ko. Markt-Redwitz (Germ.). 16 p. 11 x 14 cm. Prezo 50 Pfg.

La legado kaj rakontado en societo de tiu ĉi bonisile verkiat humoraĵoj estas rekomendinda al ĉiu, ki ŝatatas ridi kaj ridizi aliajn; sed la antaŭparolo estas skribita en peza, malfacile komprenebla stilo. Ĉu entute tia libreto bezonas antaŭparolon? (R-ano.)

## GAZETOJ.

**ESPERANTISTA LABORISTO.** Novembro. Paris, 177 rue de Bagnolet.

Tre interesa numero kun diversspeca enhavo. Gvid-artikolo: Librigita Stelo al la Verduguloj. Aliaj legindaj: El usona paradizo. Respubliko en lernejo. Letero-Respondo al la unua kaj sola bulgara llisto, s-ro Kameŝ, en Sofia. Diversaĵoj. Kroniko. Bibliografio. En speciala rubriko „Inter ni“ s-ro Krestanoff parolas pri la tromulto de niaj gazetoj kaj societoj.

**THE BRITISH ESPERANTIST.** Nov-dec. Rakontoj el la Biblio: Jona. — Aŭtuno, septoplena versaĵo de Clarence Bicknell. — La BEA preparas monpronton de minimume 1000 sterl. pundoj por la publikigo de Esp. libroj, 600 pundoj jam estas signifaj.

**GERMANA ESPERANTISTO.** Novembro. La laboro de GEA intensiĝas. Nun 82 grupoj (komence de tiu ĉi jaro 49) estas membroj de GEA. Propaganda kapitalo estas starigita; ĝis nun estas donacitaj 2120 mk. Per la prop. kapitalo oni volas eldoni (Germ. Esp.-isto) en 4000 ekz. kaj novan elfkan flugfolion. Parto de la gazetoj kaj flugfolioj estas sendota al komercaj ĉambroj, lernejestroj, leĝejoj, ŝtatregistoj, deputitoj k. a.

**MITTEILINGEN (Sciigo)** de la ligo de germanaj Esp. societoj en la deĥoslovakia respubliko. Nov.

Du-paĝa folio en germana lingvo, kaj kun kroniko en Esp.

**MORGENROOD (Matenruĝo).** Amsterdam, 25 okt. Dimanca gazeto por populara scienco, arto kaj literaturo, represis la artikolon pri „La relativaca teorio de Einstein“ (de R. Kreuz) el ET n-ro 3/4.

**O APOSTOLO.** 10 okt. Grandformata katolika ĵurnalo aperanta en Rio de Janeiro. Represis la raporton pri IKUE (de s-ro Mielert) el la unua n-roj de ET.

**NOWE TORY.** Bromberg-Bydgoszcz. N-ro 3. Grava politika revuo en pola lingvo, celas la pacan kunvivon de la germanaj kaj polaj Polujanoj. Redaktata de nia samideano Leopold Kronenberg. La n-ro 3 enhavas interalie diversajn artikolojn pri Esp.

## Repagu vian abonon!

Abono finiĝos je n-ro 11:

Villafranca en Buenos Aires (12 abonoj). Santiago en Macelo. BEA en London (10 abonoj). Boda en Felsöpulya. Karmiol en Czenstochowa. Wiherleho en Käppälä. Bartel, Halbedl, Mader, Calisto, Klobučar, Lossos, Morawetz kaj Hackl en Graz. Lidl en Donawitz. Santler en Knittelfeld. Hawell en Ramingstein. Braschke, Burda, Fiegerer, Geissler, Gleis, Habelock, Lutzin, Promnitz-Lesehale, Schilk, Sedlag, Spanke, Bochenek, Thiel kaj Wollmann en Breslau.

Broder, Emmerl, Gube, Israel, Medvey, Schikowsky, Schwaiger (5 abonoj) kaj Vater en Berlin. Plaf, Thiele, Trarbach kaj Weber en Elberfeld. Adolf, Heinrich, Lauterbach, Otto, Rödel, Röder, Wünsche kaj Zschoche en Plauen. Nüsslein kaj Altmöder en Regensburg. Laib en Rüstingen. Eden, Lorenz, Merdsche kaj Starke en Wilhelmshaven. Pilhofer, Muscat kaj Hotzelt en Nürnberg. Prieningwerth (2 abonoj) en Hirschfeld. Müller en Auerbach. Naumann en Werdau. Peltzold en Oschersleben. Rieck en Graifswald. Hankel en Dresden. Poensgen en Düsseldorf. Kraft en Braunschweig. Claus kaj Klemm en Chemnitz. Haefeker en Siegburg. Junker en Köln. Goltermann en Bielefeld. Decker en Bergstein. Esser en Ahlending.

## Libroj el Hungara Literaturo!

Petu proponojn de

**Hungara Esperanto Servo.**

Adresu al: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15, II, Budapest VI.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL ESTONIO.

Tallinn (Reval), 18 nov. 1920.

La hieraŭa numero de gazeto „Vaba Maa“ organo de la nun Estonian estrania labora partio“ („ööerakond“) aperigas skizon de klerministro J. Annusson: „La malnova kaj la nova lernejo“. La konciza resumo de ĉi tiu artikolo klariganta la perspektivojn por la evoluo de nacia estone lernejo estas jena:

La estona, nacia lernejo estas juna. Ĝi el kreskis el la ruino de la per la revolucio de 1917 detruita rusa ŝtata lernejo. Tiu ĉi lasta lernejo estis malamikigo de ĉiuj — ja tute natura! — naciaj, memstarigemaj celadoj, ĝi estis fortikajo, konservativa defendanta la panrusajn tendencojn, malnaciiganta i. a. ankaŭ la estonan junularon. Aliflanke ĝi estis ankaŭ fidela defendanto de la interesoj de l' riĉaj klasoj. La vizito de religiecionoj estis deviga por ĉiuj, la blinda parkera lernado de diversaj lingvoj flankenigis la lernadon de praktikaj, utilaj sciencoj. Al la naturscienco estis dediĉita mizere malmulte da tempo. La popola lernejo estis konsiderata kiel neevitebla malbono. La ŝtata, cetero tre abunda subsidejo de la lernejoj estis kvazaŭ nur „plenumo de la postuloj de gentilo“ antaŭ aliaj, kulturaj landoj. La plejparto de la tempo en la popola lernejo estis pasigata per religiaj lecionoj kaj rusa lingvo. Kiaj fariĝis la lernantoj absolutvanta lernejojn popolan, tio estis por la rusa regnestro tute egala.

Cetero, plikapablulo povis daŭrigi ĝis certa grado sian kleron en superaj popollernejoj. Tiuj lernejoj per sia tute tre sagaca instruistaro preparadis por la ŝtato facile regeblajn, taŭgajn administrilojn, regnificistojn, la tipajn, duone mal-klarajn „ĉinovnikojn“. La mezan kaj superan lernejojn oni rigardadis suspekto. Mez-kaj superlernejo — kiel sufiĉe dangaĵo, kvankam neeviteblaj instruoj — estis tial farataj — por plia sekuro — malfacile atingeblaj per malriĉuloj per instituo de amaso da diversaj ekzamenoj, ofte eĉ censaj postuloj. „Dum lerneja laborado kaj instruado oni ne celis la utilon de l' infano, sed la utilon de l' imperio, de l' ŝtata ordo — ĉiutempe la utilon de la kunprivilegiaj klasoj.“

Prave la aŭtoro diras, ke la lernejo estis kvazaŭ tomo. „Nek infanan ĝojon, nek vivecon kaj movemon junulon oni tie vidis. La lernantoj ĉesis esti interesataj kaj de la lernejo kaj de l' vivo. Malfacile tolerebla sistemo de numeroj kaj ekzamenoj kreskigis terure la nombron da memmortigoj inter la gelnantoj.“

Kompreneble, ke sub la malnova reĝimo cara la situacio de l' estona lernejo estis eĉ pli malfacila: ĉar al ĉi tiu supra aldongiĝis la rusiga tendenco de la ŝtatestroj. Estonido devis ĉion lerni en rusa lingvo, li devis lerni rusan historion kun ĝiaj ofte falsigitaj, elpensitaj datoj kaj faktoj glorigantaj la carismon ktp. Estona lingvo ĝenerale estis malpermesita en la lernejoj. Lernejo-inspektoroj inspektantaj la instruadon en la diversaj lernejoj estis ofte tre malinteligentuloj, estis ĝenerale ŝovinistegoj.

El tia ĉi malbona stato la estona lernejo liberigis pro la rusa revolucio 1917. Fondiĝis grandmezura movado de la estonaj instruistoj. Dum multaj kongresoj kaj subkongresoj estis ellaboritaj la programoj por nova estona nacia lernejo. La okupacio de Estonio per la germanoj en 1918 ĉesigis ĉiujn laborojn.

Post la foriro — dank' al Dio! — de la fremduloj en novembro kaj decembro 1918, la problemo de estonia nacia lernejo ellaboriĝis mirinde rapide. En mallonga tempo aperis multe da bonaj instruiloj nacilingvaj, formiĝis konsiderinda armeeto da nacilingvaj instruistoj.

Reforminte siajn lernejojn, Estonio ne estas farinta ekcesojn, ne estas paŝinta ekstremojn. „Al ni mankas ŝovinismo, karaktero por la malnova lernejo, kaj neprenisita eksperimentado, kian ni vidas en Sovjeto Rusio. En Estonio ekhavis siajn gepatrolingvaj lernejojn ankaŭ la popoloj (rusoj kaj germanoj), kiuj mem estrante neniam estus donintaj ĝin al ni.“

„La gepatra lingvo ne neas aliajn lingvojn. Nia leĝo pri popolaj lernejoj permesas la instruadon de du fremdaj lingvoj.“ La sistemo de lernejoj estas la unueca. La 6 komencaj lernejoj estas pasigitaj en samtipaj lernejoj. Post paso de la 6 unuaj jaroj la lernanto povas transiri aŭ en mezan aŭ specialan lernejojn, aŭ resti du jarojn plu en la perfektigaj klasoj de la popola lernejo. Tiel, la lernado estas deviga dum 8 jaroj. La lernadoprogramoj estas samaj por knaboj kaj knabinoj eĉ, kompreneble, gimnastikon, manlaboron ktp. Geknaboj povas esti samtempe aŭ aparte instruataj — laŭ la deziro de la gepatroj.

Ĉar la lernado estas deviga dum 8 jaroj, kaj ĉar ofte multaj ne havas la vivrimedojn bezonajn por sukcesa plenumo de la lernadpostuloj, Estonio republika donas subsidejo al pli-malpli malriĉaj infanoj.

1) La antaŭ nelonge formiĝinta nova ministraro estonia (ĉefministro prof. Ants Piip) konsistas nur el anoj de la radikalprogresma „labora partio“, prezentiganta inter la aliaj partioj kiel centra influanta politika korporacio.

2) Oni bone konas la perolon de cero Nikolao I: „Por Rusio sufiĉas okcidento de kleruloj.“

Fine la, jam citita, „leĝo pri popolaj lernejoj“ forigas la religi-instruon tute el la programo de l' popola lernejo.

Nuntempe en Estonio la partioj febre laboras, propagandas. Ĉiu pli-malpli inteligenta partiano fariĝis parolisto, dum mitingoj laŭdegas sian partion, mallaŭdegas kaj insultas la aliajn. Kiu el la konkurantoj venkos dum la balotado por Estonio parlamento okazonta 27, 28, kaj 29 nov., estas tute neeble antaŭdiri. Konkuras ĉ. po 12 listoj en 10 balottrajonoj. La plej gravaj partoprenantoj estas: du socialistaj, „laborpartio“, „terposedanta“, „popola“, kristana-popola“, „komunista“ k. a. partioj.

H. SAKARIAS.

3) Post la aperigo de mia letero jam okazinta.

Germana  
Esperanta Komercita Korporacio  
Berlin-Steglitz.

---

Rekomendinda kiel la  
plej bona  
Kristnaska donaco:

**Esperanto-Parfumo**

gr. botelo 50 mk.  
malgranda botelo 6 mk.  
— Antaŭpago. —

Mendu tuj la mondparfumon „Esperanto“!

## Abel-Kulturo.

Interŝanĝadon de artikoloj pri abelkulturo deziras

**Arthur R. Fairbairn**

21, St. Marys Terrace, Rytón-on-Tyne (Anglio).

## Por 8 svis. frankoj

(80 mk.) aŭ egalvaloraj aliaj monbiletoj mi sendas al vi la du seriojn

## pm. sovjetajn,

kiuj aperis dum la konsilantara respubliko en Budapeŝt (5 + 20 pm.),

por 12 sv. fk. (120 mk.) la pm. hungarajn kun surpreso „Konsilantar- respubliko“ kaj nova superprespo per desegnata spiko (26 pm.), laŭ peto ankaŭ aliajn hungarajn poŝmarkojn.

Rapido! — Ĝis ankoraŭ haveblaj! — Rapido!  
Hungara Esperanto-Servo (Paŭlo Balkanyi)  
Budapeŝt VI, Hajós-utca 15-11-2.

Ĉiuspacaj

**Cigarbruligiloj**  
**Karbidlampoj**

— Eksparto. —

**Muscat & Ebstein**  
**Hürnberg (Bavarujo)**

Ni serĉas reprezentantojn en ĉiuj landoj.  
— Esperanto korespondanta. —

## Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Eilersiek --- Wissmann-Str. 46  
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

### „Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondokupono aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

## Ĉiuj produktoj por ĉiuj landoj

# H. Bidaux

Esperantista Fermo.

Speciala Fako en:  
NUTRAJ PRODUKTAĴOJ — LIKVIOROJ  
— VAKSKANDELOJ —  
ŜNUROJ — ŜNURETOJ — PARFUMARO  
— FABRIKITAJ PRODUKTAĴOJ. —

S-ro H. Bidaux, Paris 12-e  
5 - Place d'Aligre.

## SILK-BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUĴO

mi sendas per rekomendita sendaĵo. Belega manfarita. Skribu, kion vi ŝatas:  
1. Esperanto-brodaĵo montras surskribon „Esperanto, Lingvo Internacia“, la verdan stelon kaj la tufmondon, 2. floroj, 3. birdo, 4. besto, 5. vidajo, 6. arbo, 15 : 20, 20 : 30 cm 25 respekt. 45 resp. kup. afrankite. — Sendu 1 resp.-kup. por specimeno. Skribu en Esp. al s-ro

C. S. Gee, Chotsarloon, Mokadee, Hai-Yen (via Shanghai), Ĥinuĵo.

A. HAJKIS, studento de fizikaj kaj matematikaj sciencoj, Warszawa, str. Koszykowa 11 - 11 (Pol.) deziras ricevi detalajn informojn pri motoroj movigataj per sunradioj, kiel la konstruitaj de Mouchot, Ericson.

AĈETO. La redakcio de ET deziras aĉeti: Histoire de la langue universelle, de Couturat et Leau; Historio kaj Teorio de Ido; Teknikan Vortaron.

AFIŝOJN, propagandilojn kun tekstoj en aŭ pri Esp. petas, kolektas kaj interŝanĝas Hungara Esp. Servo, Budapeŝt VI, Hajós-utca 15-11-2.

BIALYSTOK, la Zamenhoia naskiĝurbo. 4 div. kolorigitaj vidajoj kun Esp. teksto estas riceveblaj por 5 resp.-kup. Adresu: J. Sapiro, Lipowa 35, Bialystok (Pol.).

GAZET-SCIIGOJN por pravi la divasigitojn de Esp! Sendu konstante ĉiujn sciigojn pri interesaj novaĵoj sociaj, kulturaj, sciencaj, komercaj de via regiono per poŝtkarto por la budapeŝtajn ĵurnalojn al Hungara Esp. Servo, Budapeŝt VI, Hajós-utca 15-11-2.

KOLEKTANTOJ DE HELPMONO! Mi deziras prezarojn de ĉiutandaj helpmonoj, precipe de Germanujo (Orient-prusio 1914, helpmono de la militkapitejoj, porcelanmono, de Meissen ktp.). Interŝanĝas kontraŭ aŭstria helpmono. O. Parll, Postfach 46, Graz (Aŭstrio).

KOMERCISTOJ el ĉiuj landoj, kiuj deziras aĉeti francajn komercajn produktaĵojn, turnu vin al s-ro Maurice Ladrière, 6, rue Auguste Chabrières, Paris 15-e (Franc.).

„ESPERANTO“ n-ro 6 de 1919 serĉata. Mi petas ĝin de s-ro Paolo Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajós-utca 15-11-2.

POR „ESPERANTO“ n-ro 224 (IV/19) mi donas n-rojn 1-9 de „Nova Tempo“ aŭ ion alian. Prop. al Mühschall, Halle a. S. (Germ.), Anhalterstr. 10.

SAKO. Luigi Puppo, via del Bragone, 1-5, Genova-Sturla (Italio) volante sin perfektigi en la ŝakludo, deziras fari ludojn kun gesamideanoj per korespondado (L k. c.).

DEZIRAS KORESPONDI:

Martin Mommerg, rektoro, Heilstraße Hehn apud M.-Gladbach (Germ.) deziras pens-interŝanĝon kun alilandaj pastroj (prezidentoj de junul-unuiĝoj).

Heinr. Steinbrenner, Ziegelhüttenweg 1, Frankfurt a. M.-Süd (Germ.), Pl. L kun ĉiuj landoj.

Wihl. Natale, Städtelstr. 6, Frankfurt a. M.-Süd (Germ.), Pl. L kun ĉiuj landoj, korespondas pri specialaj temoj.

Adolfo Iter, Brahmstr. 6, Frankfurt a. M. (Germ.), Pl. L pretere pri lando kaj popolo, moroj, politiko ktp.

Walter Dahmen, stud., Köln-Kalk (Germ.), Roddergasse 52, deziras korespondadi kun itralinoj de ĉiuj landoj. Li interŝanĝas Esp. gazetojn, librojn ktp.

KORESPONDO. Samideano deziras korespondadon kun alilanduloj. A. Mausfeld, Hagen i. W. (Germ.), Arndtstr. 49.

KORESPONDO. Korespondadon kun anoj de ĉiuj landoj deziras la membroj de „Junula Societo“, loka grupo de GEA, Stendal (Germ.). Adr.: K. H. Wernicke, Priesterstr. 4.

KORESPONDO. Lingvo-instruisto Arno Lange, Werdau (Sak. Germ.), Crimmitschauerstr. 14, deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. kun eksterlandanoj kaj gesamideanoj en okupitaj teritorioj kaj respondos ĉiam.

KORESPONDO. F-ino Kato Farkas, Deak Ferencstr. 21-III-15, Budapeŝt, lernantino, deziras korespondi per Pl pri literaturo ktp.

KORESPONDO. Jozefo Major, IX. Remete str. 36-II-4, deziras korespondi kun anglaj kaj sudamerikaj ges-anoj pri literaturo, verkado ktp.

KORESPONDO. Giovanni Saggiotti, del. UEA en Padova (Italio), via S. Eufemia 4a, deziras korespondi kun ĉiutandaj gesamideanoj pri sendatena telegrafado, kaj rilata literaturo kaj gazetaro.

KORESPONDO. Luigi Puppo, via del Bragone, 1-5, Genova-Sturla (Italio) deziras korespondi kun ĉiuj per L kaj cet. Li ĉiam respondos.

KORESPONDO. Kovno (Litovujo). Leitenanto J. Masliunas, 443 p. pulkas, per L, PK, Pl kun la tuta mondo.

KORESPONDO. S-ro J. Munters, cath singel 28 bis Utrecht, Holando, deziras korespondi kun ĉiutandaj Universitataj ĵunuuloj.